SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA MOVADO

# Aktuale

SEJM

A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1978/79 №3(57) Novembro

## MEDITOJ POR MEDITIGI

Pri tio ni parolis, parolis - kaj... ricevis. Estos oficialeco, estos Asocio, estos revuo... Ĉu "la"?

EBLE! Nur eble. Kaj nur se ĉiu el ni konscios, ke:

1) la momento estas ege respondeciga kaj apenaŭ ne la plej decida por nia movado, kaj nia tasko estas, ke ĝi decidu favore al ni;

2) la "malnovaj kondiĉoj" jam pasis en Leteon;

3) nia malnova sistemo (kvankam brila por la antaŭaj cirkonstancoj) devas ilin sekvi. (Ne unuopaj TRAFAJ EROJ, nek niaj IDEALOJ, nek FINAJ CELOJ, sed la SISTEMO kiel tuto devas fariĝi historiaĵo. La lasta tasko, kiun ĝi povas kaj devas plenumi, estas elekti kaj stafeti ĉion heredindan al la novaj programo, taktiko, agado.)

Mi persone dume ne kuraĝas proponi ion konstruive kaj tuteĉe novan. Tamen pri kelkaj aspektoj mi emus meditigi.

I. P r i n i a j c e l o j

Kelkaj gesamideanoj eble jam nun kontente frotas la manojn, antaŭĝuante la baldaŭan estonton, kiam ili konvertos al E-ismo amasojn kaj amasojn.

Haltu!

Ne tio estu la ĉefa tasko en la nunaj kondiĉoj. Multe pli gravos KION ni faros, ol KIOMOPE. La lasta faktoro ESTIS unu el la decidaj ANTAŬ la oficialiĝo, ĉar laŭ ĝi oni povus juĝi nin aŭ kiel konsiderindan movadon aŭ kiel mizeran koterion. Ni estas akceptitaj kiel movadeto. Sekve por ioma tempo estas eble kaj preferinde zorgi malpli pri nia KVANTO ol pri la KVALITO. (El tio ne sekvas, ke ni entute neglektu la kvantan agaddirekton. Mi volas nur atentigi, ke ĝi ne estas la unua, sola kaj ĉefa tasko.)

Kiuj do estu niaj aktualaj celoj?

1. Perafere pruvi, ke Esperanto estas sukcesa propagandilo de la sovetaj ideologio kaj kulturo en eksterlando, brila ilo por internaciisma kaj patriotisma laboro, helpilo por studado de fremdaj lingvoj (kaj pliprofundiĝo en la propran), utila kaj taŭga tempopasigilo. Ĉion ĉi ni devas montri al koncernaj respondeculoj.

2. Rilate al la ĝenerala publiko ni havu alian taskon: informi ĝin pri la lingvo kaj movado kaj atingi laŭeble plej vastan simpation ĉie.

Tiam (post nia propra plimaturiĝo) ni semos en la jam preparitan fekundan grundon kaj nia semado estos ne nur sengrince permesata, sed eĉ aktive helpata.

: RESUME - niaj celoj estu:
: 1. Strebi al kiom eble plej efika SOCI-UTILA LABORO.
: 2. Varbi ne tiom novajn E-istojn, kiom ĈIEAJN SIMPATIANTOJN.

II. P r i n i a l a b o r o

1. Soci-utileco.

Praktike ĉiu laborero de ajna E-klubo respondas al la postulo de soci-utileco. Eĉ se tiu eco ne estas videbla tuj. Jen ekzemplo. Verŝajne, ne multaj riskus nomi soci-utila la instruadon de Esperanto. Vane, ĉar tio vere estas porsocia laboro. Rezonu mem: por E-igo de ekz. rusaj kulturaj kaj ideaj valoraĵoj nepre necesas tradukontoj. Sed de kie ili aperus, se ne de la kursoj?! Sekve oni povas tute pr-

ave skribi en sia plano (kaj poste - raporto): soci-utila agadero - preparo de tradukontoj el la rusa (E-kursoj). Neniu kuraĝus aserti, ke tio estas pure movada afero.

Do, necesas ekzameni ĉiujn niajn laborformojn kaj trovi, kie konkrete kuŝas la soci-utileco, kiel eblas ĝin reliefigi kaj pliefikigi.

Jen korespondado. Ĝi servas por propagandi niajn atingojn eksterlanden kaj plilarĝigi nian propran horizonton. Bone. Sed ĉu eblas plibonigoj? Nepre jes.

Unue, ni ofte ricevas interesajn leterojn kun pensoj pri niaj Patrio, popolo, vivmaniero k.s., kun ekzemploj de la klasbatalo okcidente, pri sukcesoj de la socialisma landaro. Ĉu iu krom la ricevintoj scias pri tio? Plejparte - ne. Domaĝe. Oni devas nepre traduki tiajn leterojn kaj proponi ilin al lokaj (eble eĉ centraj) periodaĵoj kaj al la aperontaj sovetaj E-revuoj. Tio havus duoblan efikon: manifestiĝus soci-utileco de la korespondado; oni plian fojon informiĝus pri Esperanto kaj konvinkiĝus pri ĝiaj uzeblo kaj disvasteco (vi ja certe mencius la fonton: "laŭ E-korespondado" aŭ "tradukite el Esperanto").

Due, sovetaj E-istoj ofte rakontas en siaj leteroj pri la vivo de nia lando, pri la plej gravaj eventoj kaj atingoj, historiaj kaj naturaj monumentoj k.s. Ĉu iu krom la aŭtoroj scias pri tio? Apenaŭ. Sekve, en la raportoj endus mencii: tiom da klubanoj korespondas kun tiom da E-istoj el tiom da landoj; la klubo konstante disponigas al la klubanoj materialojn, kiuj povas helpi en ilia korespondado.

: Kompreneble, el ĉio dirita ne sekvas, ke ni nur alinomu ni-
: ajn ĝisnunajn labormetodojn kaj dece raportu pri ili. Necesas
: fari ilin PLI EKSPLICITE SOCI-UTILAJ kaj trovi NOVAJN FORMOJN
: de soci-utila laboro. (Unuavice establi kreajn konstruivajn
: kontaktojn kun ĉiuj eblaj organizaĵoj: komsomolo, sindikatoj,
: packomitatoj, kulturdomoj, studentaj rondoj, societoj "Scio",
: "USSR - ..." k.s.)

2. <u>Publikaj aranĝoj.</u>

Por pli reliefe manifesti nian soci-utilecon kaj pli efike informi ĝeneralan publikon ni devas pli kaj pli "elproprasukiĝi" - "iri inter homojn".

Ekzistas du vojoj por la malizoliĝo:

1) invitadi laikojn al niaj aranĝoj;

2) kontribui al aranĝoj de laikoj.

La dua varianto estas laŭ mi multe pli sukcesiva, ĉar ĝi: a) liberigas de organizaj taskoj (inter kiuj unu el la plej esencaj estas - allogi publikon); b) efikos kiel propagandilo ne inter unuopaj personoj, sed inter tutaj tavoloj (kaj sekve preparos bonan grundon por estontaj kunlaboro, alkluba helpo aŭ E-kursoj).

: Do, "al popolo!".

3. <u>Membraro.</u>

Ĝi estas tiu ero, kiu povas kaŭzi al ni plenan kompleton da zorgoj. Post ioma, ne tro longa, tempo (dank' al niaj streboj kaj pli favoraj rilatoj flanke de respondeculoj) pri Esperanto informiĝos amasoj kaj amasegoj. Inter ili certe estos homoj, kiuj povus kompromiti aŭ misuzi nian movadon. (Veteranoj tian sperton jam havas.) Nia tasko estos preventi tion.

Mi vidas jenajn rimedojn:

1) Akcepti al E-kursoj nur post kolokvo, en kiu endas informiĝi, por kio bezonas la lingvon ĉiu kandidato, ĉu li/ŝi estas homo saĝa, bonkaraktera, ne tro ambicia ktp. (Krom ĉio alia tio kontribuus al nia prestiĝo inter la eksteruloj. Se ne ĉiu rajtas aliĝi - tio jam allogas, kaj pli multaj ekdeziros.)

2) Fari du membrokategoriojn: a) kandidato, b) efektiva membro. (Tiam ni povus raporti al interesitoj pri ambaŭ kategorioj, sed ne respondeci pri misagoj de la neklubanoj.)

3) Ne pacience atendi venontojn, sed aktive varbi inter taŭgaj

kontingentoj. (Nepre ne forgesi pri junularo, sciencistoj, profesiaj instruistoj, artistoj, ĵurnalistoj. Multe helpus al nia prestiĝo se ni sukcese varbus inter laboristoj.)

: Do, ne bonvenigu ajnulojn, zorgu pri la kluba konsisto!

4. Informado kaj raportado.

Ambaŭ devas esti veraj adoj.

Estas farita ia soci-utila laboro? - Tuj raportu al lokaj komunikiloj kaj sovetaj E-periodaĵoj (aperontaj). Okazos interesa aranĝo kun zorge preparita programo, eminentaj gastoj, multnombra publiko? - Sciigu pri tio redakciojn. Venis taŭgaj materialoj el eksterlando? - Publikigu ilin; faru seminarion, ekspozicion, prelegon sur ilia bazo. Kompilu revuajn artikolojn pri via laboro 2-3-foje en jaro. Preferu multajn malgrandajn informojn kaj artikoletojn, kie oni nur menciu Esperanton, ol pure priesperantajn "mastodontojn". Psikologio pruvas, ke pli da efiko havos la unua metodo. Krome, la praktiko montras ke etaj sciigoj havas pli da ŝancoj trafi surpaĝen.

Detale raportu al ĉiuj interesitoj:
1) al la senpera estraro (eble eĉ ĉiumonate);
2) al komsomolaj kaj sindikataj instancoj;
3) al la urba (respublika, centra) gvidorgano de la E-Asocio;
4) al la propraj klubanoj.

Ne pigru ĉiumonate prepari skriban raporton pri la jam farita kaj sekvamonate farota laboroj. Sendu tiajn raportojn al ĉiuj membroj, kiuj ne aŭskultis ilin en la klubo. Pendigu viajn planojn kaj raportojn (dulingve) en la klubejo(j). Faru fotajn kaj desegnajn ilustraĵojn. Almenaŭ dufoje en jaro faru revu-analizan raporton: estis planite - farite - fiaskis (pro kio).

: Nur labori estas duono de la afero. Endas ankaŭ lerte kaj
: ĝustatempe informi kaj raporti.

5. Kursoj.

Ne strebu al ilia troabundeco. Se eblas aranĝi kurson, sed mankas TAŬGA gvidonto, prefere prokrastu. Se vi komisios la instruadon al nekompetenta persono, tio efikos pli noce, ol se vi entute ne aranĝos la kurson. Ĉar ĉiu, komencinta lerni la lingvon ĉe diletanto, nepre fariĝos malamiko de Esperanto kaj (ne dubu!) tre sukcese malvarbos per tute pravaj asertoj, ke li jam havas sperton pri Esperanto kaj ke "ili eĉ kontentigan instruiston trovi ne povas".

Penu kiel eble prestiĝigi la kursojn. Se vi rezidas ĉe Kulturpalaco - faru la kursojn pagaj (kiel ekz. pri la angla). La sperto montras, ke al tiaj kursoj aliĝas veraj interesitoj, sed ne preterirantaj hazarduloj. Se vi sukcesis penetri en altlernejon - provu aranĝi E-fakon ĉe FOP (fakultato de sociaj profesioj). Se vi instruas en lernejo, provu atingi la fakultativecon.

Ankaŭ la kursa kontingento gravas. La praktiko montras, ke pli sukcesaj estas tiuj kursoj, al kiuj aliĝas jam pretaj grupoj - kolektivetoj. Tial estus ne malbone havi bazon ĉe iu kohera kolektivo (ekz. entreprenejo aŭ altlernejo). Sed necesas ankaŭ bazo, kie povas esti instruataj diverstavolaj kursanoj (pleje taŭgas Kulturpalaco).

Ne trompu laikojn, promesante ekposedon de la lingvo post 1 - 2 monatoj. Ŝajnas, ke malpli ol 6-monata kurso estas malutila blufo. (Esceptoj certe ekzistas.)

Ĉiu kursgvidanto strebu ricevi specialan ateston ĉe akademiano P.Ariste aŭ aliloke (ekz. ĉe FOP).

Ne forgesu, ke Esperanton oni komencas lerni unuavice por interese pasigi la tempon. Do viaj lecionoj devas ne lacigi, sed iasence ripozigi. Nepre enestu humuro, kantoj, gajaj dialogoj ktp.

: Kontingento, instruisto, metodo. Se almenaŭ unu el ili estos misa, via kurso nepre estos malutila.

Do, jen estas miaj rezonoj kaj konsideroj pri "ni en la novaj kondiĉoj".

Mi ne pretendas absolutan pravecon aŭ originalecon kaj ankoraŭfoje atentigas, ke ĉio skribita supre estas nur miaj (ne SEJM-estra-

raj) pensoj.

Tiun ĉi artikolon mi sendas samtempe al kelkaj SEJM-aktivuloj. Do mi atendas oponojn, subtenojn, aldonojn kaj esperas je viaj komprenemo kaj reagemo.

A.Melnikov, prezidanto de SEJM.

## NE MEDITU NI SENFRUKTE

"MEDIT/I (ntr). Longe fiksi kaj koncentri sian penson sur io" (PIV)

Tre atente tra- kaj releginte la "Meditojn" de A.Melnikov, mi kuraĝas demandi la legantojn de "A": ĉu vi longe fiksis vian penson sur la ĉapitroj"Pri niaj celoj" kaj "Pri nia laboro"? Eble vi havis fortan emon al tuja diskutbatalo kun la aŭtoro? Mi - ne. Mi kun ambaŭ ĉapitroj konsentas kaj fere aprobas eĉ la ambiciajn sloganojn, kiel ekz. "Do, 'al popolo'!". Ĉio estas klara. Trarigardu almenaŭ la decidojn de la lastaj Konferencoj, kaj ankaŭ vi klare ekvidos, ke la celoj, ankaŭ la taskoj, kiujn la aŭtoro nomas aktualaj, vere ne malaktualiĝis dum pluraj jaroj de la "malnovaj kondiĉoj". Do - revelacio ne okazis... Certe mi rimarkis la frazon: "Mi persone dume ne kuraĝas proponi ion ... novan". Vane vi ne kuraĝas, Aleksandro. Nome kuraĝon la SEJM-anoj atendas nome de vi en tiu "ege respondeciga" momento.

Nur la sola afero igis min mediti, nome la funebra parolo pri la "forpasanta" SISTEMO. Kio do estas tiu sistemo, kiun forpasigas A. Melnikov? Ĝi estas SEJM - sistemo de organizita kaj koordinita interkluba kunlaboro. Kaj ni jam konsentis dum la lasta Konferenco, ke heredinda estas preskaŭ ĉio, sed ne "unuopaj trafaj eroj" (pri idealoj kaj finaj celoj ni ne parolu). Certe, fari "historiaĵo" la sistemon, kiun ni kune kreadis dum multaj jaroj, estas multe pli facile, ol krei almenaŭ ion similan...

Nu, kaj se mi jam kuraĝis skribi ĉion ĉi, mi kuraĝu ankaŭ, ne daŭrigante la senutilan insultadon, eldiri kelkajn miajn opiniojn pri la plej aktuala celo.

La antaŭvidata fondo de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj evidente okazos. Okazos ankaŭ la fonda Konferenco de ASE en SSOD. Do, la plej aktuala nia celo estu nasko de la Asocio laborkapabla, ne simila al kelkaj ekzistantaj. Por tio mi proponas al eventualaj delegitoj levi en la fonda Konferenco proksimume jenajn demandojn:

1. Statuto de la Asocio devas nepre respeguli la eldonrajton por monata bulteno. Ne almanako kiel "Por la paco", sed revu(et)o simila almenaŭ al "der esperantist", enhavanta interŝanĝon de sperto, informojn, movadajn kaj interlingvistikajn artikolojn - krom ĉio cetera kaj memkomprenebla.

2. La sama Statuto devas antaŭvidi organizon, aŭ almenaŭ helpon de ASE al lokaj kluboj en organizo, de amasaj interklubaj aranĝoj laŭ speciala kalendaro aŭ plano.

3. Kion fari pri la fakoj de SEJM? Pri la Terminologia Centro? Pri la Belarta, Instrua fakoj? La laboro, sendube utila, farita de aro da SEJM-anoj, pereos, se ĝin ne gvidos kaj ne helpos la Asocio.

4. Mi jam diris, ke mi fere konsentas kun A.Melnikov preskaŭ pri ĉio. Sed plej fere mi konsentas, ke ni devas zorgi nun malpli pri kvanto nia, ol pri la kvalito. Kaj unuavice - pri la kvalito de E-instruistoj: aliokaze ni neniam sukcesos zorgi pri la kvanto de E-istoj. Do la Statuto devas respeguli ankaŭ nepran preparadon de altkvalitaj instruantoj de la lingvo dum proksimaj 5 - 10 jaroj.

Se almenaŭ tiuj ĉi demandoj solviĝos pozitive - ni jam havos aeron por spiri. Kaj pri aliaj aferoj ni povos paroli iom poste kaj pli kviete.

Kaj laste mi kuraĝas eldiri unu proponon por SEJM-Konsilantaro.

Mi proponas, ke malgraŭ eventuala fondo de la Asocio en decembro SEJM funkciu dum la transira periodo, t.e. ĝis la somero 1979, kiam la SEJM-Konferenco decidos ĝian sorton.

M.Bronŝtejn, Honora Aktivulo de SEJM.

## REZULTOJ DE SOCIOLOGIA ENKETADO EN OrSEJT-20

La enketadon partoprenis 119 personoj. Ili prezentis respondojn al 19 demandoj.

1.Aĝo.

Viroj - de 7 ĝis 55 jaroj, meza aĝo - 23,8 jaroj, ĝis 20 jaroj - 29,5%, de 20 ĝis 30 jaroj - 54,5%.

Virinoj - de 11 ĝis 53 jaroj, meza aĝo - 21,7 jaroj, ĝis 20 jaroj - 41,3%, de 20 ĝis 30 jaroj - 49,3%.

Totala (por viroj kaj virinoj) meza aĝo - 22,5 jaroj.

2.Sekso.

44 viroj, 75 virinoj.

3.E-staĝo.

Viroj: 20 jaroj - 1, 18 jaroj - 1, 15 jaroj - 1, 14 jaroj - 2, Sume E-iĝis antaŭ 1970 - 18,2%, en 1970 + 76 - 40,1%, en 1977 + 78 - 40,1 %. Meza staĝo de viroj - 4,3 jaroj.

Virinoj: 10 jaroj - 1, 8 jaroj - 1, 7 jaroj - 1, 6 jaroj - 1, 5 jaroj - 4. E-iĝis antaŭ 1970 - 1,3% (1 pers.), en 1970 + 76 - 38,7%, en 1977 + 78 - 60%. Meza staĝo de virinoj - 1,3 jaroj.

Do, viroj estas multe pli "staĝaj", ol virinoj.

Totala meza staĝo - 2,4 jaroj.

4. Kiel vi ekscios pri Esperanto?

| Respondo | viroj | virinoj | totale |
|---|---|---|---|
| anoncoj | 25% | 29,3% | 27,7% |
| gazetaro | 20,4% | 14,7% | 16,8% |
| de konatoj kaj parencoj | 20,4% | 20% | 20,1% |
| prelego | 4,5% | 4% | 4,2% |
| televido | 2,3% | 2,7% | 2,6% |
| el libroj | 2,3% | 1,3% | 1,7% |
| en lernejo | 2,3% | 6,7% | 5,1% |
| en teknikumo aŭ supera lernejo | 4,5% | 8% | 6,7% |
| ne respondis | 15,9% | 10,7% | 12,6% |
| aliaj | 0% | 1,3% | 0,8% |

5. Kial vi ekstudis Esperanton?

| | | | |
|---|---|---|---|
| pro scivolemo | 25% | 14,7% | 18,3% |
| intereso pri lingvoj | 9,1% | 9,3% | 9,2% |
| Esperanto ekplaĉis kiel lingvo | 6,8% | 18,7% (ĉu pli da estetika sento?) | 14,2% |
| pro facileco | 4,5% | 5,3% | 5% |
| por paroli kun la tuta mondo | 11,4% | 9,3% | 10% |
| por ekvidi novajn homojn, ekhavi novajn amikojn | 4,5% | 2,7% | 3,3% |
| ĉar ĝin parolis iu | 4,5% | 1,3% | 2,5% |
| logis la ideo | 2,3% (1 pers.!) | 2,7% (2 pers.) | 2,5% |
| aliaj celoj | 2,3% | 16% | 10,8% |
| neklaraj respondoj (eble ne ĉiuj sufiĉe posedis la lingvon: enketiĝis 44 komencantoj) | 34% | 24% | 27,5% |

6. Ĉu vi vizitas la klubon?

| Respondo | viroj | virinoj | totale |
|---|---|---|---|
| en nia urbo ne estas klubo | 11,4% | 10,7% | 10,8% |
| ĉiusemajne | 41% | 32% | 35% |
| eĉ pli ofte | 6,8% | 4% | 5% |
| sufiĉe ofte | 13,6% | 20% | 17,5% |
| neofte, malofte | 11,4% | 20% | 16,8% |
| ne vizitas | 9,1% | 4% | 5,9% |
| aliaj respondoj | 6% | 9,3% | 7,6% |

7. - 8. Kiujn E-tendarojn vi vizitis? Kiu tendaro plaĉis al vi pleje? Kial?

| Tendaro | viroj | | virinoj | |
|---|---|---|---|---|
| | vizitis | nomis ĝin la plej bona | vizitis | nomis ĝin la plej bona |
| 1962 Latvio | 1 | | | |
| 1963 Estonio | 1 | | | |
| 1964 Litovio | 1 | | | |
| 1965 Latvio | 1 | | | |
| 1966 Estonio | 1 | | | |
| 1967 Litovio | 2 | 1 | | |
| 1968 Altajo | 5 | 2 | 1 | 1 |
| 1969 Karpatio | 2 | 1 | 1 | |
| 1970 Baŝkirio | 1 | 1 (100%) | 2 | 2 (100%) |
| 1971 Kievo | 3 | | 2 | |
| 1972 Apudmoskvo | 2 | 1 | 1 | |
| 1973 Latvio | 8 | 2 | 1 | |
| 1974 Ivanovo | 5 | 1 | 5 | 2 |
| 1975 Ustj-Kamenogorsk | 10 | 1 | 10 | 5 |
| 1976 Tiĥvin | 13 | 4 | 15 | 6 |
| 1977 Miass | 14 | 7 | 17 | 7 |
| 1977 Poltava | 3 | 1 | 6 | 4 |
| 1978 Altajo | 44 | 9 | 75 | 6 |
| 1964 UzbET | 1 | | | |
| 1970 UzbET | 1 | | 1 | |
| BETоj | 11 | 1 | 4 | 1 |

Klarigis sian elekton de la plej bona tendaro 18 viroj kaj 23 virinoj. El tiuj 41 klarigoj 19 havas pure personan karakteron (ĉar ĝi estis mia unua tendaro, ĉar venis miaj plej ŝatataj amikoj, ĉar mi jam povis libere paroli, ktp.). Ni kredas plene al tiaj klarigoj, sed ili ne spegulas veran kvaliton de la tendaroj.

Pli objektivaj motivoj:
naturo, vetero, turismaj kondiĉoj - 5 viroj kaj 1 virino;
bona organizo - 1 viro kaj 4 virinoj;
alta lingva nivelo - 1 viro kaj 4 virinoj;
multe da spertuloj - 1 viro kaj 4 virinoj;
interesaj homoj - 4 virinoj.

Pri du tendaroj necesas diri aparte.

La unika tendaro, kiun ĉiuj vizitintoj nomis la plej bona - estas SEJT-12, organizita en 1970 far Ufa E-klubo. Vere, la ciferoj estas ne tro reprezentaj, ĉar tie estis nur 3 personoj, tamen...

Altajon-1978 oni plejparte ne menciis eĉ inter vizititaj tendaroj - ĉar ĝi ankoraŭ ne estis finiĝinta. Pro la sama kaŭzo multaj ne taksis ĝin. Krome, ĉiuj unuafojaj tendaranoj ankaŭ ne taksis ĝin, ne havante kun kio kompari. Pro tio la donitaj ciferoj pri tiu ten-

daro ne spegulas realan staton. Tamen almenaŭ du personoj skribis, ke ĉi tiu tendaro plaĉis al ili pro bona organizado.

9. Ĉu vi korespondas kun eksterlando? Kiom da korespondligoj vi havas?

El la 44 viroj tute ne korespondas 19, la aliaj 25 havas sume 144 korespondligojn (meze po 5,7 korespondligoj je 1 persono).

El la 75 virinoj tute ne korespondas 35, la aliaj 40 havas sume 124 korespondligojn (meze po 3,1 korespondligoj je 1 persono).

Korespondado laŭ jaroj de E-iĝo:

| Jaro de E-iĝo | 1958 | 60 | 63 | 64 | 66 | 68 | 70 | 71 | 72 | 73 | 74 | 75 | 76 | 77 | 78 | sume |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| viroj | 1 | 1 | 1 | 2 | 1 | 2 | 1 | 1 | 2 | | | 6 | 7 | 14 | 4 | 44 |
| korespondligoj | | 2 | 1 | 5 | 9 | 25 | 3 | | 10 | | | 2 | 40 | 24 | 3 | 144 |
| virinoj | | | | | | 1 | 1 | 1 | 1 | 4 | 2 | 6 | 14 | 24 | 21 | 75 |
| korespondligoj | | | | | | | 4 | 3 | 1 | 20 | | 34 | 38 | 15 | 9 | 124 |

10. Ĉu vi abonis ĉi-jare E-eldonaĵojn? Kiom?

| Kvanto de abonoj | 0 | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | sume |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| abonis viroj | 16 | 8 | 6 | 5 | 1 | 3 | 3 | | 1 | | 1 | 90 |
| abonis virinoj | 31 | 19 | 11 | 8 | 1 | 1 | 2 | 1 | 1 | | | 103 |

El la 44 viroj nenion abonis 16 (35,6%). La aliaj 28 abonis sume 90 eldonaĵojn (meze po 3,2 eldonaĵoj je 1 persono). Meza nombro por ĉiuj viroj (kiuj abonis aŭ ne) - 2 eldonaĵoj.

El la 75 virinoj nenion abonis 31 (41,3%). La aliaj 44 abonis sume 103 eldonaĵojn (meze po 2,3 eldonaĵoj je 1 persono). Meza nombro por ĉiuj virinoj - 1,2 eldonaĵoj.

11. Ĉu vi vojaĝis eksterlande pere de Esperanto?

El viroj 5 personoj vojaĝis 1-foje kaj 1 persono 7-foje. Virinoj ne vojaĝis.

12. Kiuj formoj de E-laboro pleje plaĉas al vi?

| Respondo | viroj | virinoj | totale |
|---|---|---|---|
| tendaroj, renkontiĝoj | 80% | 82,7% | 81,7% |
| klubaj kunvenoj | 33,3% | 30% | 31,7% |
| korespondado | 33,3% | 37,3% | 35,8% |
| aliaj | 15,6% | 13,3% | 14,3% |

13. Ĉu vi legis E-librojn?

| Kvanto de libroj | 0 | ĝis 5 | ĝis 10 | ĝis 20 | pli ol 20 | malmulte |
|---|---|---|---|---|---|---|
| legis viroj | 12 (27,3%) | 12 (27,3%) | 6 (13,6%) | 8 (18,2%) | 4 (9%) | 2 (4,5%) |
| legis virinoj | 27 (36%) | 33 (44%) | 9 (12%) | 2 (2,7%) | | 4 (5,3%) |

14. Kiel vi imagas la celon de E-agado?

Paco, amikeco, internaciaj kontaktoj, frateco, unuiĝo de homoj - 55,8% de ĉiuj respondoj.

Ne respondis 4 viroj kaj 22 virinoj.

Kelkaj originalaj respondoj:

1) vivi sen tradukistoj;
2) unu el rimedoj de socia kaj persona evoluo;
3) vigligi la cerbojn, korojn kaj korpojn;
4) konkeri tutan terglobon (!);

5) ebligo al homoj montri siajn fortojn;
ktp.

15. Kiu flanko de E-movado interesas vin?

| Respondo | viroj | virinoj | totale |
|---|---|---|---|
| la ideo | 44,4% | 57,3% | 52,5% |
| homoj | 53,3% | 64% | 60% |
| vojaĝoj | 57,7% | 56% | 56,7% |
| la lingvo | 48,9% | 69,3% | 61,7% |
| aliaj | 6,7% | 1,3% | 3% |

16. Ĉu ni bezonas 1 tendaron aŭ 2?

| Kiom da tendaroj | 1 | 2 | 3 | 2 aŭ 3 | ne 1 | multe | ne resp. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| viroj | 18 | 11 | 1 | 4 | 1 | 4 | 5 |
| | (40,9%) | (pli ol 1 sume – | | | | 47,7%) | (11,4%) |
| virinoj | 50 | 17 | | | | 3 | 5 |
| | (66,7%) | (pli ol 1 sume – | | | | 26,7%) | (6,7%) |

17. Via plej ŝatata E-kanto?
Viroj: "Oriento" (6 voĉoj), "Ne, ne, ne" (5), "Sezonoj", "Revis mi pri forir'", "Mi pace iris kun amik'", "Pipo" (po 3).
Virinoj: "Oriento" (14), "Sezonoj", "Kanto de mulisto" (po 12), "Revis mi pri forir'" (7).
Totale: 1. "Oriento" (E-teksto de L.Novikova) - 20 voĉoj, 2. "Sezonoj" (M.Bronŝtejn) - 15, 3. "Kanto de mulisto" (J.Zajdman) - 14, 4. "Revis mi pri forir'" (D.Lukjanec) - 10, 5. "Ne, ne, ne" (D. Lukjanec) - 9 voĉoj.

18. Ĉu vi longe intencas aktivi en Esperanto?

| Respondo | viroj | virinoj | totale |
|---|---|---|---|
| ĝis la morto | 26,7% | 16% | 20% |
| longe | 24,4% | 50,7% | 40,8% |
| dependas de cirkonstancoj, ne respondis | 42,2% | 29,3% | 34,2% |
| nelonge | 6,7% | 4% | 5% |

19. Se vi ne estus esperantisto, ĉu vi volus iĝi esperantisto?
Viroj: jes - 73,3%, ne scias - 20%, eble ne - 6,7%.
Virinoj: jes - 89,3%, ne scias - 10,7%.

Preparis N.Korĵenevskaja, N.Cvileneva (Ufa).

## PAROLIGA PERIODO EN OrSEJT-20

La PP daŭris 5 diurnojn. 8 grupoj disiris kaj loĝis aparte ĉe lagbordo. Du grupoj restis en la tendarejo.
Ĉiu grupo konsistis el proksimume 15 personoj kaj estis gvidata de grupestro kaj lingva instruanto. Post la reveno de la piedmarŝintoj okazis kunveno de aktivuloj, kie oni priparolis rezultojn de PP. La grupestroj kaj lingvaj instruantoj - Gercikov, Samodaj, Sapoĵnikov, Vdovin, Kulagina, Zaĥarĉenko, Ŝarov, Korĵenevskaja, Isakov, Tartiŝev, Jakovlev, Paŝĉenko, Miĉurina k.a. opinias, ke ĉi-jare PP estis tre sukcesa kaj utila. Kompare kun la pasinta jaro ni mallongigis la marŝadon kaj donis ĉefan atenton ne al marŝado, sed al la lingvo. PP ebligis al multaj komencantoj bone ekparoli kaj amikigis la novvenintojn. Ni decidis unuanime, ke PP estas nepre bezonata. Ĝi povas esti samdaŭra - 5 tagojn.

Dum la pridiskutado aperis kelkaj proponoj por sekvontaj tendarestroj:

1. Eble eĉ 4 tagoj sufiĉos.
2. Necesas bone organizi distribuon de turistaĵoj ĉe foriro kaj reveno de la marŝgrupoj.
3. En ĉiu grupo nepre devas esti gitaristo. Oni enmetu en la aliĝilon demandon pri kapablo gitarludi.
4. Necesas fari grupan planon.
5. Tute nepre estas havi apartan lingvan instruanton kaj apartan grupestron (en tri grupoj tiuj gvidfunkcioj koincidis); ambaŭ devas esti spertuloj.
6. Necesas sciigi la lingvan instruanton anticipe - li devas prepariĝi al sia laboro.
7. Necesas havi proksimuman programon de instruado aŭ almenaŭ temaron. Ĉu ekzistas finfine Instrua fako?
8. En ĉiu grupo devas esti 4 - 5 aktivuloj. Eble oni iom pligrandigu la grupojn - tiam aktivuloj estos pli multaj.
9. Post PP estas dezirinde lokigi samgrupanojn kune.
10. Eble ne necesas dissendadi la grupojn diversflanken dum PP. Eblas vivi en la tendaro mem, instrui la lingvon kaj fari ekskursojn laŭgrupe.

N.Korĵenevskaja (Ufa).

## PENETRI ĈIEN!

Antaŭ du jaroj mi unue ekscîis pri Esperanto kaj partoprenis en SEJT-18. Post ekzameno B.G.Kolker enmanigis al mi E-ateston, kaj mi iĝis arda kaj fervora esperantisto. Ĉi-jare la kvanto de E-studantoj en Taganrog devas atingi jam 1000.

En Pionirdomo funkcias 3 rondetoj kun po 15 lernantoj kaj junulara E-klubo, kiun prezidas J.Bondarev - lernanto de 8-a klaso. Pasintjare la klubo okupis la duan lokon en konkurado inter 39 rondetoj. Ĉiumonate ni faras "tagon de malfermitaj pordoj", dum tiuj tagoj la klubon vizitis gaste 191 lernantoj. Estis pendigita oficiale presita anonco pri Esperanto en ĉiu el 34 lernejoj. Fine de jaro ni resumas rezultojn de socialisma konkurado kaj elektas "la plej bonan esperantiston de la jaro". Ricevas premiojn ankaŭ 10 lernantoj, kiuj invitis aliajn al lernado de Esperanto. La direktoro de la Pionirdomo kaj la metodistoj helpas en laboro. Eĉ venis aliaj direktoroj kaj petis organizi E-rondetojn en lernejoj, sed ne sufiĉas fortoj. Estas nur 3 rondetoj en lernejoj.

Funkcias E-klubo, kies 5 membroj iĝis ĉi-jare subtenantoj de SEJM. La klubo kunvenadis laŭvice en ejoj de tri diversaj uzinoj. Ŝanĝante la lokon, ni povis popularigi Esperanton en tiuj uzinoj. Ĉi-jare la kubo organizis kursojn en fizik-matematika (Goldinova) kaj fremdlingva (Mitrofanov) fakultatoj de la pedagogia instituto.

Krom tio, la duan jaron funkcias ĉiumonataj kursoj ĉe Buroo de priservado. Tio estas ŝtata organizaĵo kun 37 entreprenoj, trama parko; ĝi faras 500 servojn por la loĝantaro. Tieaj funkciuloj estas tre kontentaj, ke ni perlaboras monon por ili, kaj helpas al ni en propagando de Esperanto. Ili faris 3 ŝildojn en la plej amasaj lokoj de la urbo. Ĉiumonate ili aperigas anoncon pri E-kursoj en la taĝurnalo, krome en centro de la urbo estas afiŝo kun ĉiumonataj datoj de komenco de la kursoj. La Buroo kelkfoje helpis presi "Inviton al studado de Esperanto" en eldonkvanto 1000 ekz. La direktoro de la Buroo ordonis al ĉiuj siaj servoj pendigi la inviton al E-kursoj: en frizejoj, kudrejoj, muzikaj studioj, luejoj, surbendigejoj ktp., ĉar ili havos profiton, se venos multaj lernantoj al la pagataj kursoj. Ĉiuj kursfinintoj aliĝas al "Interklubo", kiu akceptas ankaŭ neesperantistojn, kiuj deziras pli multe ekscii pri Esperanto aŭ intencas lerni la lingvon estonte.

En la urba muzeo en ĉambro de amikeco duan jaron funkcias ekspozicio "Esperanto - lingvo de amikeco", sed ĝi aspektas tre pale kompare kun donacoj de KIDoj. Kiuj povas helpi - sendu interesajn E-donacojn.

Ni ĉiusemajne publikigas artikolojn kun mencio pri Esperanto. Artikolas ankaŭ neesperantistoj; ekz. unu ĵurnalisto skribis, ke estas donacita E-lernolibro fare de bulgaraj amikoj. Dum du jaroj estas publikigitaj pli ol 200 artikoloj: "Tolstoj kaj Esperanto", "Ĉeĥov en Esperanto", "Gorkij pri Esperanto", "Esperantujo-19 vokas vin", "15 tagoj en Esperantujo", "Ni parolas en Esperanto", "Esperanto en Bulgario", "Jeroŝenko - E-poeto", "Esperanto - lingvo de optimistoj" ktp.

Pere de la societo "Znanije" ni faris septembre kaj komence de oktobro 15 prelegojn kun 650 vizitintoj. Novembre en la ĉefa legejo ni organizos dum tuta monato ekspozicion "Esperanto - lingvo de estonto". Kiu havas bonajn fotojn - sendu, vi ricevos artikolojn.

Ni regule trarigardas la urban ĵurnalon kaj kontaktas kun interesaj kaj famaj homoj, pri kiuj mencias la ĵurnalo. Ni penetras laŭ niaj fortoj en ĉiujn oficialajn organizaĵojn. Ni estas jam konataj al kolektantoj, ĵurnalistoj, filatelistoj, universitato de laboristaj korespondantoj, kursoj de tajpistinoj, klubo de ŝakistoj. Ni vizitas ĉiujn amasajn prelegojn kaj ĉe konvena okazo (ekzemple, venis al ni sciencfikcia aŭtoro el Moskvo Gureviĉ; respondante al 200 homoj li diris i.a. ke esperantistoj petis permeson traduki lian verkon al Esperanto) donacas al famulo E-libron, insignon aŭ prospekton. En "Nedelja" №33 ni tralegis pri la klubo "renkontiĝo, familio kaj edziĝo"; nun ni ĉiumonate vizitas ties vesperojn kaj eĉ organizis viktorinon pri Esperanto. Estas ideo organizi ensemblon "Esperanto", kiu vojaĝus tra la lando kaj propagandus la lingvon, ĉar koncertojn vizitadas multaj kaj agitado per kanto estas pli efika.

Ni uzas ĉiujn kanalojn kaj eblecojn por propagandi Esperanton!

G.Mitrofanov (Taganrog).

## DEDIĈE AL LA GLORA JUBILEO

Miassa E-klubo "Malaĥita stelo" okazigis solenan klubkunsidon, dediĉitan al la 60-jara jubileo de Komsomolo, la 29-an de oktobro en Kulturpalaco de aŭtouzino. Ĝin partoprenis ankaŭ gastoj el Ĉeljabinsk kaj Satka. Antaŭ la klubkunsido okazis la urba komsomola manifestacio, kiun partoprenis ankaŭ la esperantistoj.

Dum la solena kunsido okazis prelego pri la XVIII-a Kongreso de Komsomolo (A.Knjazev). Reprezentanto de la Kulturpalaco enmanigis honoratestojn de Miassa gorkomo de VLKSM al la plej bonaj aktivuloj de la E-klubo: Novikova L.L., Koptjagina T.A., Dobridina V.N., Grebenjuk V.G. Salutis kaj bondeziris al la ĉeestantoj la direktoro de la Kulturpalaco kiel komsomolano de 40-aj jaroj kaj Koptjagina T.A. kiel komsomolanino de 30-aj jaroj. Ili rakontis pri sia aktivado en Komsomolo kaj deziris al la komsomolanoj de 70-aj jaroj ĉiam esti fidelaj al nia Komunista partio, al nia amata Patrujo kaj pligrandigi la glorajn farojn de Komsomolo.

L.Novikova tralegis raporton al Miassa gorkomo de VLKSM pri la kvinjara agado de la klubo. Poste niaj geklubanoj prezentis literatur-muzikan komponaĵon el versaĵoj de Eduard Bagrickij kaj la kanton "Granado". Sekvis komuna kantado kaj rakontoj pri ĉi-someraj tendaroj.

Ĉiuj estis tre kontentaj kaj dankaj al la klubmastroj.

N.Kalik, sekretariino de Miassa E-klubo.

DU UTILAJ HELPILOJ

Dum la seminario pri E-instruado enkadre de la IV-a Konferenco de ukrainiaj esperantistoj estis eldiritaj interesaj pensoj kaj konsiderindaj proponoj.

Sekve de tio USEA eldonis jam du bonajn instruilojn: "A-radikaro. Minimuma radikaro por elementa kurso de Esperanto" de V.Enko kaj "Esperanto-proverbaro (400)" de A.B.Rogov.

Pri kieva sperto kaj la unua helpilo estis detale skribite en "A"- 2(56), paĝoj 23 - 26.

Uzo de E-proverboj, same kiel de kurtaj rimigitaj tekstoj, havas en E-instruado gravan didaktikan signifon. Pri tio kaj pri laboro kun proverboj dum la instruado estas enhavriĉe dirite en la metodikaj konsiloj de la menciita helpilo de A.B.Rogov. Altatalenta E-instruisto kun riĉa sperto, A.B.Rogov atribuis grandan valoron al vigleco, allogeco kaj amuzeco de la instruado. En la IV-a E-konferenco li rakontis al ni pri sia sperto kaj menciis vortludojn, enigmojn, kantojn, proverbojn, ŝercajn demandojn ktp.

Ni tute kaj plene konsentas kun tiu ĉi metodo kaj kun la enhavo de la suprenomitaj artikoloj en "A".

Laŭ nia opinio, la progresa aŭdodemonstra metodo kune kun la distra kaj interesa gvido de E-leciono devas doni la plej bonajn rezultojn.

Plue ni volas montri, ke la radikaro estas tre bona helpilo ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por ĉiuj perfektiĝantaj esperantistoj. Plej bone oni povas utiligi ĝin, laŭ nia opinio, jenamaniere.

Kiam grupo de lernantoj jam ellernis la bazon de la lingvo, inkluzive gramatikon kaj vortfaradon, kaj proksimiĝas al la fino de la A-kurso, la ĉefa malfacilaĵo iĝas la manko de vortaro, precipe dum parolado kaj skribado.

Dum la legado la procedo okazas iom pli bone, ĉar ĉi tie helpas vidmemoro kaj la pasiva memoro, kiam la lernanto ekmemoras, ke la vorton li jam renkontis pli frue.

Do, aperas urĝa neceso larĝigi la vortaron de la lernantoj kaj fiksi ĉiujn vortojn en la memoro firme - aktive.

Sed ni estas kategoriaj oponantoj de parkerigado. Oni devas lerni la vortojn en kunteksto aŭ kun helpo de mnemonikaĵoj kaj "paŭsaĵoj" de nacilingvaj vortoj, kiel tion rekomendas la konata E-lernolibro de B.G.Kolker. Per la radikaro la kursgvidanto povas kontroli la progreson de ĉiu lernanto kaj lian ĝeneralan vortaron.

La instruisto kaj la lernantoj malfermas la radikarlibretojn, kaj la gvidanto komencas unu post alia laŭtlegi la vortojn de la radikaro. Lernanto, kiu ne scias la signifon de iu vorto, levas la manon kaj metas ĉe la vorto en sian radikaron punkton per ordinara krajono. La gvidanto klarigas tiun vorton kaj laŭtlegas plu. Rezulte ĉiu lernanto scias, kiuj vortoj estis por li ĝis nun nekonataj, iliajn signifojn kaj suman kvanton.

Li scias ankaŭ la kvanton de nemarkitaj vortoj de la radikaro, do li povas esprimi en procentoj sian scion de la radikaro je tiu ĉi dato.

La dimensio de la libreto ebligas porti ĝin en poŝo aŭ sakete kaj uzi ĉiutage dum la libera tempo, ekzemple: en metroo, en trolebuso ktp.

La lernantoj lernas la vortojn, markitajn per punktoj, kaj iom post iom forviŝas la punktojn, kiam la vortoj estas firme ellernitaj.

La lernanto tre klare povas vidi kaj kontroli siajn progresojn fakte kaj en procentoj, ĝis la momento, kiam li plene posedas la tutan radikaron.

Mia sperto en alia lingvo pruvas, ke la priskribita metodo estas tre efika. Sed mi devas averti, ke oni povas komenci lerni la

vortojn de la radikaro nur tiam, kiam ne malpli ol 60 - 70% de ĝiaj vortoj estas jam ellernitaj.

Poste, kiam ĉiuj vortoj de la radikaro estas ellernitaj kaj memorfiksiĝis aktive, mi rekomendas al progresantoj daŭrigi lernadon kun helpo de la radikaro duope.

Unu lernanto (aŭ gvidanto) laŭtlegas la vortojn unu post alia aŭ en arbitra ordo. Dua lernanto devas klarigi la signifon de ĉiu vorto en Esperanto.

Ekzemple:

Pluvo - pluvo estas atmosferaj akvaĵoj; akvo, kiu falas de la ĉielo.

Fiŝo - fiŝo estas estaĵo, kiu naĝas, vivas kaj spiras sub akvo, ktp.

La detaleco de klarigoj dependas certe de la lingvaj scioj de la respondanto.

Laŭ nia du aperigitaj de USEA broŝuroj estas bona suplemento al la akceptitaj kaj elprovitaj metodoj de E-instruado.

Ni aprobas la valoran iniciaton de USEA.

V.Solovjov (Sevastopol).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

SOLVIĜIS POZITIVE

la demando pri alkalkulo de poentoj por kelkaj kluboj, kies raportoj ne atingis ĝustatempe la Komitaton (vidu "A"-2, p.32; "A"-1, p.8). Temas ne pri revizio de la rezultoj de la socialisma konkurado, sed nur pri aparteno de la kluboj al tiu aŭ alia kategorio en la nova agadjaro. Kun tiuj rekonsideritaj poentsumoj (markitaj per x) la distribuo laŭ kategorioj estas jena:

"A": Klaipeda (1646), Krasnojarsk (1605), Omsk (1543), Ufa (1458), Kievo (1049), Riga (1035).

"B": Moskvo (977), Ivanovo (896), Lvov (895), Ĥarkov (807), Angarsk (752x), Leningrado (636), Tjumenj (628x), Miass (574x), Doneck (524x).

"C": Novosibirsk (464x), Zaporoĵje (430), Soĉi (374), Kujbiŝev (373), Ŝalavat (348), Petropavlovsk-Kamĉatskij (336), Barnaul (335), Meĵdureĉensk (333), Vilnius (321), Tiĥvin (295), Sterlitamak (212), Viljandi (204), Kaunas (200), Ĥmelnickij (181), Novomoskovsk (171), Rostov-Don (169), Pärnu (169), Siktivkar (153), Permj (118), Magnitogorsk (104).

Kandidatoj: Ĉeljabinsk (0), Maĥaĉkala (0), Sizranj (0), Talgar (0), Ustj-Kamenogorsk (0), Tula (0), Volgograd.

NI EVITU KVERELOJN

Mi rimarkis, ke lastatempe en diversaj anoncoj pri eventualaj E-aranĝoj enradikiĝas stranga frazo: "Organiza komitato rezervas al si la rajton rifuzi partoprenon al personoj, kies ĉeesto ne estos dezirinda."

Laŭ mia opinio, tio estas tre ofenda. Mi neniam aliĝus al simila renkontiĝo, ĉar mi ne estus certa, ke oni ne rifuzos ankaŭ al mi. Estas interese, kiu povas juĝi objektive pri aliaj homoj? Alia afero estas, se iu partoprenanto ne subiĝas al la ordo. Tiajn personojn ni vere devas puni.

Mi proponas pridiskuti tiun temon en "A", ĉar ni ne rajtas ofendi homojn - kontraŭe, ni devas batali por ĉiu homo, kiu ekinteresiĝis pri la Internacia Lingvo.

S.Neilande (Riga).

La informilo estas uzenda nur enlande! Fintajpita 16.II.78.
Ĉiujn materialojn por "A" sendu al 121019 Moskvo d/v Aroloviĉu V.S.